Aprilo 2012

Mi salutas ĉiujn legontojn de tiu numero de Konstru-Forumo. Vi eble legis miajn ret-measaĝojn en kiuj mi postulis iom da afableco kaj ĝentileco en niaj interŝanĝoj. Mi ne repritraktos la temon, dezirante ke nia laboro antaŭeniru. Bedaŭrinde, la konsideroj pri la metodoj en la laboro terminologia lasis min pensema kaj mi atendis konkretajn proponojn je via flanko. Iuj skribas al mi, ke koncerne la temon « ĉarpento », mankas sistemo. Nu, mi akceptas la kritikon, sed mi atendas precizajn proponojn. Bonvolu proponi labor-planon, kun ekzemploj.

Aliflanke, en la antaŭaj numeroj de Ko-Fo, restis temoj ne finitaj kun terminoj ne fin-deciditaj

- Ekzemple : N° 46 **balkoj kaj kampo aŭ spano** KF 28
- N° 54 **Bildvortaro Duden 276 – planko, tekto, ŝtuparo** KF 30/31

(Tiu N° 54 estas la lasta aperinta en la numeroj de Ko-Fo verkitaj de Jan Werner.)

Se vi estas interesata de iu speciala temo, eble jam parte traktita, bonvolu sciigi tion.

En antaŭa mesaĝo, mi proponis al vi listigi la diversajn metiojn de la dom-konstruado. Tio konsistigos novan temon, **la N° 55.**

**Temo N° 55 La metioj de la konstruado.**

Jen komenca listo laŭ la sinsekvaj etapoj de la konstruado. Kompreneble, tia listo ne estas kompleta, kaj mi petas vin, 1° legi kaj proponi alian klasifikon, se tiu ne plaĉas al vi. 2° kompletigi ĝin. 3° Modifi, korekti la proponitajn vortojn por tiuj diversaj metioj.

Rimarko : ĉu indas distingi la nociojn de « metio » kaj « profesio » ?

En la naciaj lingvoj, foje la distingo ne estas klara. Eble, ni konsideru, ke « profesio » rilatas al la okupo en la konstruado, ĉu la koncerna homo estas kvalifikita,ĉu ne. Dum la nocio « metio » implicas formadon, ĝeneralan regadon de la diversaj taskoj, nome tiu nocio estas ligita kun scipovo, kun kvalifiko. Ekzemple , laŭ la nocio de profesio, man-laboriston sen kvalifiko (kiel help-masonisto) oni povas nomi « masonisto », ĉar li laboras en masonista entrepreno ; li ne vendas florojn ! Male, laù la nocio de metio, tiu sama laboristo ne povas esti taksita masonisto pro manko da ĝenerala kono de tiu fako.

Kion vi pensas pri tiu maniero distingi ambaŭ nociojn ?

Lima rimarko 1 : aldonu, ke la ĉi-sekvaj proponitaj profesi-nomoj koncernas egale virojn kaj virinojn. Ni do ne skribos la profesiajn nomojn ankaù kun la in-sufikso.

Lima rimarko 2 : Kiam temas pri profesiulo kiu agadas en diversaj etapoj, ne estas necese remencii lin/ŝin, precipe se temas pri ne-specialisto de la konstruado (Ekz : kamion-ŝoforo)

I **PREPARAJ LABOROJ POR LA DOM-KONSTRUADO** :

1 En la oficejoj arĥitekta, kaj aliaj

- La urbanisto : tiu fakulo studas la problemojn de la integriĝo de la nova konstruaĵo ene de la jam ekzistanta urba reto.
- La arkitekto
- La desegnisto pri planoj
- La juristo pri konstruado (se necesas apud la arĥitekto)
- La geometro (mezuras la konstruota tereno, determinas ĝian situon)

2 En la diversaj stud-oficejoj

- La inĝeniero pri geologio kaj *fundaĵoj*
- La inĝeniero pri betono
- La inĝeniero pri ŝtalaj konstruktoj
- La inĝeniero pri ĉarpento kaj tegmentoj
- La inĝeniero pri hejtado
- La inĝeniero pri elektraj ekipoj

- La inĝeniero pri ventolado, izolado, ktp….
- La inĝeniero pri energi-ekonomioj …. KTP

Noto : Ne devige inĝenieroj, ankaŭ alte kvalifikitaj teĥnikistoj tie laboras .

- La nombristo : tiu fakulo kapablas nombri kaj kalkuli kiujn kaj kiom da elementoj necesas antaŭvidi (kaj mendi) Ekz : kiom da ŝtalaj stangoj por la betono, kiom da cemento , kiom da fenestroj kaj kiaj, kiom da tuboj, ktp, ktp. (france= mètreur)
- La kontisto / ekonomisto (kalkulas la kostojn, mendas la materialojn, foje kontraktas kun sublaboranta entrepreno)

3 Ĉe antaŭa malkonstruado :

- Teknikisto pri malkonstrua sekureco
- Laboristo en malkonstruo
- Kondukisto de maŝino
- Kamion-ŝoforo

**II DUM LA KONSTRUADO-MEM.**

4 Ĉe la konstruado ĝis la tegmento

- La kondukisto pri la konstru-laboroj
- La masonista team-estro kaj aliaj teamestroj

Fundamento :

- Kondukisto de fos-maŝino
- Man-laboristo (ŝovelilo kaj pioĉo)
- Aliaj : vidu ĉi-sube ĉe masonado

Masonado :

- Masonisto pri tradiciaj teknikoj
- Masonisto – kofristo- pri betono
- Ferajîsto (preparas la ŝtalajn stangojn : tiu mtio iom postiome malaperas :la ferajoj estas nun muntitj kaj velditaj en specialaj entreprenoj kaj alportitaj per kamiono)
- Kondukisto de gruo (tur-gruo, kamion-gruo, ktp) = gruisto
- Pucisto
- Riparisto pri malglataj surfacoj (specialigado de masonisto) (france = *ragréeur*)
- Ŝton-tajlisto kaj skulptisto

Ĉarpentado :

- Ĉarpentisto pri tradiciaj lignaj konstruktoj
- Ĉarpentisto/muntisto pri antaŭfabrikitaj ĉarpentaj elementoj
- Ĉarpentisto pri specialaj konstruktoj (ekz : larĝspanaj)
- Ĉarpentisto pri ŝtalaj konstruktoj
- Lutisto (Ne devige : tio estu ankaŭ kompetenteco de la ŝtalĉarpentisto)
- Ĉarpenta gruisto (en specialaj laboroj, necesas specialisto) (france = levageur)

Tegmentoj :

- Tegmentisto pri tradiciaj materialoj
- Tegmentisto-ladisto
- Tegmentisto specialigita en regionaj teknikoj (plat-ŝtonoj, pajlo ; ktp)
- Kovristo pri industriaj konstruaĵoj. (france = *bardeur*)

5 Ĉe la ekipado de la konstruaĵo

Internaj strukturoj

- Teknikisto pri metalaj konstruktoj ( france = *serrurier)*
- Gipsisto
- Muntisto pri gipsaj vandoj
- Muntisto pri krom-plafonoj
- Muntisto pri ventolaj ekipaĵoj

Noto : Ĉiuj tiuj profesiuloj nepre kompetentu pri samtempa muntado de izol-materialo

Pordoj kaj fenestroj :

- Lignaĵisto
- Fabrikisto kaj/au muntisto pri pordoj kaj fenestroj el aluminiumo / PVC
- Vitristo

Akvaj retoj

- Muntisto pri purakvaj tuboj, kloakaj tuboj, ĉe antaŭkonstruaj laboroj.
- Tubisto / muntisto pri sanekipaĵoj (bankuvo , necesejo, lavŝtono, duŝo, ktp)
- Hejtisto / muntisto pri hejt-aparatoj ne elektro-energiaj
- Muntisto pri energi-ŝpariloj (varm-pumpiloj, sunkaptiloj, ktp)
- Aliaj retoj (ekz. en hospitaloj : oksigeno, malpleno kaj similaj)
-

Prisurfacaj laboroj :

- Kahelisto
- Muntisto pri malrigidaj (plastaj) surplankaj elementoj
- Tapetisto
- Muntisto pri gluitaj tapiŝoj ( jen nepre korektenda nomo !) (france = *moquettiste*)

Farbado :

- Farbisto
- Farbisto-ornamisto

Elektraj retoj :

- Elektristo de la konstruado ( diferencigita de l'elektristo industria)
- Elektristo/elektronisto pri komunikaj kaj informaj retoj (telefono, internet, televido, ktp)
- Elektrista muntisto pri strata prilumado
- Aliaj ?

III **POSTKONSTRUAJ LABOROJ**

6 Bontenado kaj riparado :


Bontenado de la ekipaĵoj :

- La ĉi-supre menciitaj profesioj ĉe la 2a paragrafo
- Bontenisto pri hejt-materialo
- Plurfaka bontenisto (mult-kompetenta)
- Sen-skafalda riparisto (ŝnur-riparisto) (specialigita en laboroj ĉe alteco)4 Salubrecaj laboroj :
- Sen-ratigisto
- Kontraùinsekta pulvoristo (precipe ĉe lignaj ĉarpentoj) ( jen nepre korektenda nomo !)
- Sen-asbestisto
- Purigisto

7 Dumkonstrua kaj postkonstrua kontrolado :

- Dom-diagnozisto ( pri malsanaj elementoj kiaj plumbo, asbesto, ks)
- Kontrolisto pri menditaj laboroj / kontrolisto pri kvalito
- Teknikisto / inĝeniero pri teknika kontrolado de la konstruktoj
- X

Lima rimarko 3 Estus multe por aldoni ….




**Temo N°42** Plu pri ĉarpento !

Antaù ol analizi pli detale, mi proponas al vi listigi kaj klasifiki la diversajn fakojn de tiu profesia familio :
Ĉiu cifero, ĉi-sube legebla referencas al ekonomia malsimila aktiveco. Se vi konsentas, ni devos poste en ĉiu paragrafo listigi la sub-fakojn. Bonvolu plibonigi, aldoni, kritiki (afable !)

1. Ĉarpentado pri oblikvaj tegmentoj
2. Ĉarpentado pri lignaj domoj
3. Ĉarpentado pri skafaldoj
4. Ĉarpentado pri pontoj
5. Ĉarpentado pri portempaj kofroj (pontoj, volboj kaj aliaj konstruktoj)
6. Ĉarpentado pri lignaj ŝipoj
7. Alia … ? (Ekz : pri minejaj galerioj)

ĈARPENTO DE KATEDRALO
Jam en mezepoko (jaroj 1200 / 1300 kaj postaj) la ĉarpentistoj majstris sian arton konstruante katedralojn.



KONSTRUADO de FERVOJA PONTO

Dum  la 19a jarcento kaj la komenco de la 20a, la fervojaj retoj amase disvolviĝis en Eŭropo kaj en la mondo, kio necesigis la konstruadon de multaj pontoj, ĉu lignajn, ĉu ŝtonajn. Multegaj profesiuloj sin aktivis, precipe masonistoj, ŝton-tajlistoj akj ĉarpentistoj.  Hodiaŭ, oni malfacile imagas la kompleksecon kaj malfacilecojn de tiaj laboroj !